

La gesta instruado de esperanto

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-799/244, 1979 februaro 01 kaj 03

http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-35/SRI-1979-35-A-1-244-799-1979_02_01_03_Claude-Gacond-La-gesta-instruado-de-esperanto.mp3

Cl.- Parolas Claude Gacond. Dum pli ol unu jaro mi havis la ŝancon povi refoje gvidi eksperimenton pri esperanto-instruado en elementa lernejo. Tio estas, en lernejo, kie lernas infanoj dek kaj dekunu jaraj. Jam sep fojojn mi gvidis tiajn eksperimentojn en la celo, iom post iom perfektigi la metodologion de la esperanto-instruado. Ĉi-foje mi uzis neniun lernolibron kaj absolute forlasis la kutimajn lerneajn ĝenrojn, tio estas la sidado en klasejo kaj la aŭskultado. La esperanto-kurso konsistis el du studperiodoj. Unu el ili disvolviĝis en la gimnastika salonego kaj kunigis ĉiujn gelernantojn interesatajn por dudek minuta leciono pri esperanto. Mi agis kaj parolis uzante nur esperanton kaj proponis al la gelernantoj min geste kaj parole imiti. Kaj la sukceso estis grandega kaj daŭra. Al tiu ĉi instruado mi donas la nomon 'gesta instruado'. Oni ankaŭ povas diri 'pergesta instruado'. Kaj pri tiu instrutekniko mi parolos al vi dum prelegaro. La alia dudek minuta studmomento estis dediĉita al aŭdvida instruado. Mi foje jam raportis al vi pri tiu ĉi instru-tekniko, kiu estas ankaŭ tre fruktodona. Kio gravas, se ni volas ke esperanto iom post iom ludu rolon en la lerneja vivo, tio estas ke ĝi sin prezentu sub originala vesto. Ke ĝi metodologie proponu kion oni ne povus fari kaj atingi per alia lingvo. Ni estas konvinkitaj ke nuntempe la situacio estas matura por ke esperanton oni rekonsideru en la lernejoj medioj. Kio bedaŭrinde ne samtempe maturiĝis, tio estas la argumentado kaj pretiĝado de la metodologoj. Ĉu ni eĉ povas diri ke esperanto posedas propran metodologion? En multaj landoj apenaŭ ekzistas kelkaj pedagogoj, kiuj interesiĝis pri la problemo. Nuntempe en Svislando laboradas komisiono kies nomo estas *Esperanto lernejen*. Ĝi laboras en la celo pretigi argumentadon akcepteblan de la instruinstancoj favore al la enkonduko de esperanto en la lernejojn. Samtempe pli kaj pli detala metodologio kaj precizaj programoj estas diskutataj en la kadro de tiu komisiono, kiu dependas fakte de Kultura Centro Esperantista (KCE). Venontan someron en la kadro de la dua kurs-sesio de Internacia FERIA Altlernejo (IFA) mi havos la okazon gvidi seminarion pri aŭdvida kaj gesta instruado. Se la prelegaro kiun mi nun komencos vin interesos, vi povos tiun ĉi kurson sekvi kaj tiel lerni tuj post la Universala Kongreso, kiel oni instruas pergeste esperanton.

Pergesta instruado mi komprenas la studon de lingvo - do ne nur de esperanto, fine oni povus instrui ĉiun ajn lingvon tiel - en ĉiutagaj situacioj, en viv-situacioj, kie la korpo movo ĉiam akompanas la parolon. Jen, mi citas al vi erojn el raporto, kiun mi ĵus pretigis por la instruinstancoj de mia regiono.

Do, tiu eksperimento komenciĝis en marto 1976 kaj finiĝis en junio 1977, 78. La instruisto ekde la unua minuto sin esprimas do nur en esperanto. Eĉ por doni klarigojn li agas kaj li instigas la gelernantojn fari la samon per gestaj ekzercoj, ludoj, konkursoj, divenaĵoj esperanton li instruas laŭ tre preciza programo, kiu akcentas la kontrolon unue de la elparolo kaj iom post iom de la akirado de fundamenta vortaro, kiu respondas al la agoj, kiujn oni povas efektivigi en gimnastikejo kaj kiuj estas ligitaj al la homa korpo, al la objektoj realaj kaj imagaj, kiujn oni povas renkonti en la lerneja vivo. Nur unue oni havas inican fazon. Estas per la gesta instruado oni inicas la lernantojn al la karaktero de la lingvo. Tiu inica fazo estas dediĉita al unue lernado de verboj prskribantaj fundamentajn agojn. La instruisto agas tute simple kaj prskribas siajn agojn. Li vekas la imitadon far la gelernantoj.

Jen ekzemplo de tute komenca instruado. La instruisto parolas agante. ‘Mi salutas : Bonan tagon !’, ‘Mi sidiĝas’, ‘Mi sidas nun’, ‘Mi stariĝas’, ‘Mi staras’, ‘Mi saltas’, ‘Mi kuras’, ‘Mi haltas’, ‘Mi frapas la pordon’, ‘Mi frapas la muron’ kaj vi vidu samtempe la instruisto faras tiujn frapojn. Li unue salutas, poste li sidiĝas. Nun li montras ke li ne plu agas sed estas trankvila, do sidas. Poste li restariĝas kaj la infanoj iom post iom imitas lin kaj provas prononci tiujn verbojn. Mi daŭrigas : ‘Mi frapas la plankon’, ‘Mi rigardas la pordon’, ‘Mi rigardas la plafonon’, ‘Mi falas’, ‘Mi kuŝas’, ‘Mi ploras’, ‘Mi ridas’, ‘Mi silentas’, ‘Mi kontentas’, ‘Mi malkontentas’, ‘Mi estas hundo kiu bojas, vaŭ, vaŭ’, ‘Mi estas koko, kiu kikerikas, kikeriko, kikeriko’, ‘Mi estas kokino kiu klukas, kluk’, kluk’’, ‘Mi estas violono kiu muzikas’, ‘Mi estas ŝoforo kiu stiras’, ‘Mi estas infano kiu kuras kaj saltas’, ‘Mi estas maljunulo kiu lamas’, ‘Mi estas nun laca’, ‘Mi kuŝiĝas’, ‘Mi dormas kaj ronkas’ kaj ĉiuj infanoj ankaŭ eksilentas kaj ronkas.

Do tiel vi komprenas kiel mi agas. Tiujn frazojn ni multe ekzercas. La infanoj kapablas poste ekagi kaj ankaŭ priskribi sian agon. La sola pronomo kiun ili konas ĝis tiam estas: ‘mi’.

Kiam tiuj tre simplaj frazoj estas ne nur ripeteblaj, sed bone konataj de la gelernantoj, ke ili kapablas ilin mem diri, kiam ili faras la koncernajn agojn kaj ludas la bestojn menciitajn, oni faras paŝon antaŭen kaj eklernas la konjugaciajn pronomojn kaj la verbajn formojn.

Tiucele du bonaj rimedoj estas: la dialogado kaj la prokrastitaj ordonoj.

Venontan fojon ni vidos tre detale kio estas tiuj dialogoj kaj ĉefe tiuj prokrastitaj ordonoj, kiuj estas tre efikaj.

Vi aŭdis prelegon el Svislando pri la gesta instruado en elementa lernejo. Venontan semajnon ni daŭrigos tiun prezenton. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!